Heinrich Heine,

# Du fratoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Sur la monta pint' situas
Noktvelite la kastel';
Sed envale triste bruas
Fulmaj glavoj en malhel'.

Estas fratoj batalantaj
Furioze en duel',
Per la glavoj sin batantaj.
Kial tiu ĉi kverel'?

La kverelo incendiĝis
Per rigardo de grafin';
Ambaŭ arde enamiĝis
Al la bela nobelin'.

Sed al kiu el la fratoj
Ŝia kor' alturnu sin?
Cerbumado ne, nur batoj
De la glav' decidos ĝin!

Estas ili skermadantaj
Furioze kontraŭ sin.
Gardu vin, ĉar kaŝ-irantaj
Fi-demonoj trompos vin!

Ve, vi sangaj uloj frataj!
Ve, vi sang-avida val'!
Ambaŭ estas mortigataj
De la aliula ŝtal'.

Forbloviĝis la jarcentoj
Post terura la duel';
Entombiĝis multaj gentoj,
Ruiniĝis la kastel'.

Sed en jena val' senbrua
Dum la nokto demonar'
Ĉirkaŭiras, je l' dekdua
Ekbatalas la frat-par'.

. . .

Heinrich Heine,

# Zwei Brüder

Oben auf des Berges Spitze
Liegt das Schloß in Nacht gehüllt:
Doch im Tale leuchten Blitze,
Helle Schwerter klirren wild.

Das sind Brüder, die dort fechten
Grimmen Zweikampf, wutenbrannt.
Sprich, warum die Brüder rechten
Mit dem Schwerte in der Hand?

Gräfin Lauras Augenfunken
Zündeten den Brüderstreit.
Beide glühen liebestrunken
Für die adlig holde Maid.

Welchem aber von den beiden
Wendet sich ihr Herze zu?
Kein Ergrübeln kann's entscheiden -
Schwert heraus, entscheide du!

Und sie fechten kühn verwegen
Hieb auf Hiebe niederkracht's.
Hütet euch, ihr wilden Degen,
Böses Blendwerk schleicht des Nachts.

Wehe! Wehe! blutge Brüder!
Wehe! Wehe! blutges Tal!
Beide Kämpfer stürzen nieder,
Einer in des andern Stahl.

Viel Jahrhunderte verwehen,
Viel Geschlechter deckt das Grab;
Traurig von des Berges Höhen
Schaut das öde Schloß herab.

Aber nachts im Talesgrunde
Wandelt's heimlich, wunderbar;
Wenn da kommt die zwölfte Stunde
Kämpfet dort das Brüderpaar.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Zwei Brüder" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1984-01-27.*

*MR-119-1 / Arg-213-420 (2004-03-14 13:39:35)*

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj", sekcio „Junaĝaj suferoj – romancoj", n-ro III.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17), publikigita 1817-1821.*

*Arg-213-419 (2004-03-14 13:34:05)*

*Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „Buch der Lieder", im Abschnitt „Junge Leiden – Romanzen", Nr. III.*